
# Kiom da .....?



1. Kiom da paĝoj estas en via vortaro?
2. Kiom da fingroj vi havas?
3. Kiom da veraj viroj estas en tiu ĉambro?
4. Kiom da fingroj vi vidas?
5. Kiom da flugiloj havas birdo?
6. Kiom da jaroj mi aĝas?
7. Kiom faras 2 kaj 2?
8. Kiom da krokodiloj sidas en tiu ĉi ĉambro?
9. Kiom da manoj havas tablo?
10. Kiom da steloj estas en la ĉielo?
11. Kiom da homoj estas en futbal-teamo?
12. Kiom da literoj vi ĉiutage skribas?
13. Kiom da fruktoj vi manĝis hodiaŭ?
14. Kiom da ĝirafoj loĝas en via hejmo?
15. Kiom da literoj havas via alfabeto?
16. Kiom da legomoj kreskas en via ĝardeno?
17. Kiom da nazoj havas elefanto?
18. Kiom da birdoj scipovas naĝi?
19. Kiom da kalvuloj estas en la grupo?
20. Kiom da landoj vi vizitis?
21. Kiom da kruroj havas araneo?
22. Kiom da gefratoj vi havas?
23. Kiom da oreloj estas sur via kapo?
24. Kiom da eraroj estas en tiu ekzerco?
25. Kiom da lingvoj vi parolas?
26. Kiom da noktoj estas en unu jaro?
27. Kiom da flankoj havas ĵetkubo?
28. Kiom da tagoj estas en du semajnoj?
29. Kiom da lingvoj ekzistas sur la Tero?
30. .........................................................

- neniom
- kvin
- proksimume tridek
- kvar
- kiu vivos, tiu vidos
- mil kvincent
- ĉirkaŭ kvin mil
- malmulte (da)
- du
- kvar
- multe (da)
- kiu scias?
- miliono
- duono
- tio estas sekreto
- demandu iun alian
- tricent sesdek kvin
- bonvolu ripeti…
- pli ol vi kredas
- se mi scius!
- lasu min pensi!
- tridek tri
- minimume ses
- vi estas tro scivolema
- naŭcent okdek sep
- ŝercu vi!
- sesdek naŭ
- mi neniam pensis pri tio
- lasu min en paco!
- ...............................

Kiel mi uzas la ekzercon *'Kiom da…'*:

Enkonduko de la ekzerco:

Mi tre serioze anoncas al miaj grupanoj sciencan eksperimenton por vidi ĉu ili vere regas E-on.
Mi klarigas ke pruviĝis, ke *tiuj personoj kiuj devas pripensi antaŭ ol respondi demandon, ne kapablas fikse rigardi en la okulojn de la demandinto, sed ili aŭtomate rigardas supren, flanken aŭ suben*.

Fakte veras, ke oni tiel povas observi kiun komunikkanalon la demandato plej volonte uzas. *Rigardemuloj* supren 'devojiĝas' por trankvile pripensi, *aŭskultemuloj* flanken, *spertemuloj* suben. Sed iu al kiu oni starigas simplan demandon normale ne bezonas pripensi la respondon – almenaŭ se tute regas la lingvon. Mi kutime demonstras tion, pridemandante publike unu el la kursanoj, unue pere de la denaska lingvo (espereble ne devojiĝas la okuloj), kaj due en Esperanto (normale devojiĝas ili pro la pripensado).

Ekzerco: kun enmane la papero, la grupanoj, irante ĥaose de unu al la alia, starigas la demandojn rigardante rekte en la okulojn de la aktuala parolpartnero. La pridemandato devas provi ne devojiĝante respondi. Se la energio, kreata de la instruisto estas sufiĉe vigla, ekestos ene de du minutoj tre ĝoja eksplodo de demandoj/respondoj kun aktiva partopreno de ĉiuj.

Rimarkoj:
Laŭ la nivelo de viaj kursanoj, vi povas (aŭ ne) *tralegi la demandojn kaj respondojn antaŭ ekigi la 'eksperimenton'*.
Postludo povas esti ligi sur la papero la demandojn (maldekstre) kun la plej logikaj respondoj (dekstre). Notu ke ili NE estas skribitaj en la "ĝusta" ordo.

NB: gramatike, povas esti interese rimarkigi ke, post 'kiom da' oni neniam uzas akuzativon.